

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio, pri la disvolviĝo de la mondanistaj ideoj.

Mi citis, ĉe la fino de mia lasta prelego, ke la korespondado inter Einstein kaj Freud tuŝis al la kampo de la mondanismo. Ni citu du dirojn de Einstein. En 1921 la granda fizikisto jam avertas la homojn kontraŭ unu el la danĝeroj, kiuj minacas la konstruon de la mondo. Li diras : « *La naciismo estas infana malsano : ĝi estas la morbilo de la homaro.* »

Albert Einstein estas hodiaŭ konsiderata kiel la plej grava sciencisto de la unua kvarono de nia jarcento. Liaj teorioj estis unue akre pridiskutitaj, sed ekde 1909 ili estis adoptitaj de la aliaj sciencistoj. En 1921 Einstein ricevis la Nobel-premion por fiziko.

Jam en 1933 Albert Einstein avertis la registarojn kontraŭ la danĝero de la armado. En kontribuo publikigita ĉe la Akademio de Sciencoj li subtenas la provojn pri malarmado kaj priskribas la danĝerojn, kiujn kaŭzos la uzo de la nukleaj eksplodiloj.

La historia evoluo pruvis, ke Einstein ne nur estis klarvidanto rilate fizikon, sed ankaŭ rilate politikon. Tiu sciencisto juddevena ne kapablis pensi naciskale. Li naskiĝis germana en Ulm en 1879, adoptis la svisan naciecon ĉe la fino de la deknaŭa jarcento, kaj en 1940 li fariĝis usonano. Estas en Princeton, usona universitata urbo, ke li mortis en 1955. Tri jarojn antaŭ sia morto Einstein konstatis, ke la homoj « *ĉiuj pasive atendas, ke la aliaj ek-iniciatu organizi supernacian aŭtoritaton.* » Kaj li avertas nin, ke « *se la celo ne estas ĝustatempe atingita, ĉiuj homoj respondecos pri tio.* »

Ni ĉiuj konas la faman diron de Einstein : « *Ni devas ŝanĝi nian pensmanieron.* » Ni esperantistoj havas grandan respondecon tiurilate. Nia monda lingvo helpas nin pensi tuthomare. Sed vera viva penso devige influas la agojn de siaj portantoj. Ĉu nia esperantista penso influas nian ĉiutagan vivon ? Mi ne respondos al tiu demando. Ĉiu devas respondi mem, ĉar ĉiu respondecas.

Teilhard de Chardin, unu el la plej grandaj paleontologoj de nia epoko, diris : « *La epoko de la nacioj forpasis. Nun necesas konstrui la teron.* » Tiu konstato fariĝis certe la devizo de multaj agemaj homoj.

Antaŭ la dua mondmilito kelkaj tiuj agemuloj provis fondi organizaĵojn, kies ĉefa tasko estis plibonigi la funkciadon de Ligo de Nacioj. En 1924 estis lanĉita la ideo, ke Konstituciantaro de Popoloj estas fondenda. En 1937 komenciĝis kampanjo por Monda Registaro. Ĝin estris usonano, sinjoro Lloyd, el la urbo Ĉikago. Du jarojn poste ankaŭ el Usono venis nova alvoko. La Federala Unuiĝo, sub la konduko de s-ro Streit, grupigis membrojn el dekduo da landoj.

Usono estas federacio, kiu tiam grupigis 49 ŝtatojn. Ĝi naskiĝis de la ellaborado en 1787 de Konstitucio, kiun ratifiis iom post iom la nacioj de preskaŭ tuta kontinento. Novaj landoj ĉiam povas eniri tiun federacion. Tion faris en 1959 Alaska kaj Havajo. Lloyd kaj Streit pensis, ke laŭ la modelo de la usona federacio povus naskiĝi tutmonda federacio grupigonta iom post iom ĉiujn naciojn de la mondo sub sola Registaro. Ni vidis, ke Edmond Privat esprimis la saman ideon kelkajn jarojn antaŭe en la fama verko *Interpopola Konduito*. Li ankaŭ vivis en federacio. Svislando grupigas ekde 1848 19 kantonojn kaj 6 duon-kantonojn sub federala konstitucio kopiita sur tiu de Usono.

Tiu laboro por monda federacio estis interrompita de la dua mondmilito. Sed tiu konflikto pruvis plian fojon la neceson organizi nian ĥaosan internacian vivon. Ĉefe en Usono juristoj grupiĝis por studi projekton de Monda Federacio. Ilia projekto estis proponita en 1945 al la Konferenco de San Francisko. El ĝi naskiĝis, post multaj ŝanĝoj, kiuj bedaŭrinde malofte estis plibonigoj, la organizo Unuiĝinta Naciaro.

La aliĝintaj nacioj ne volis cedi parton de sia aŭtonomeco profite al supernacia organizaĵo. Jen troviĝas la kaŭzo de la malfacilaĵoj renkontataj en la funkciado de Unuiĝinta Naciaro. Tio ankaŭ estis la ĉefa kaŭzo de la fiasko de Ligo de Nacioj.

Ekde 1945 ĉie en la mondo naskiĝis movadoj, kies celoj estas popularigi la ideon de monda federacio kaj studi proponojn, kiuj fariĝas ĉiam pli kaj pli detalaj. Tiuj proponoj nun estas ekzamenataj tre serioze en la medioj mem de UN. Ili certe influos reformon de la Ĉarto de Unuiĝinta Naciaro, reformon, kiu estis rifuzita en 1955, sed kiu fariĝas ĉiam pli urĝa.

Edmond Privat en la fino de sia verko *Federala sperto* konklude formulas kelkajn necesajn plibonigojn. Unue la nacioj devas rezigni sian absolutan suverenecon. Due Kunveno de Ŝtatelegitoj, kiel la nuna Unuiĝinta Naciaro, ne sufiĉas. Apud ĝi devas ekzisti Federacia Parlamento elektata de la tuta monda loĝantaro kaj esprimanta la ĝeneralan popolan deziron al paco kaj normala vivo. En la franca redakto de tiu verko, kiu aperis dum la milito en 1942 sub la titolo *Trois expériences fédéralistes* [*Tri federaciaj eksperimentoj*] li aldonas trian kondiĉon absolute necesan al normala funkciigo de tutmonda federacio, tio estas la adopto de monda lingvo, kiu permesas pli taŭgajn kontaktojn interhomajn, ol la sistemo de la multekosta sammomenta tradukado. Tiu monda lingvo personigos iom post iom la ekziston de la monda federacio.

Multaj juristoj alvenis hodiaŭ al la samaj konkludoj.

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond pri la disvolviĝo de la mondanistaj ideoj. Se tiu temo vin interesas, aŭskultu regule Radio-Svislandon.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-